



ESPERANTO

KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Aperas monate sub la aŭspicio de la
FRANCA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ
(G. E. E.)

Redakto - Sekretario :
D-ro Andreo ALBAULT
11, rue des Feuillants
Toulouse (Francio)



Eldono - Direktoro :
H. MICARD, Emerita Instruisto
Epineux - le - Séguin (Mayenne)
Francio

Numero 10
DECEMBRO
1956

Jara abono : 400 fr. fr., pagenda en Francio al
Edmond BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio.
Post-cek-konto : 143-867 Nantes ;
aŭ al la landaj perantoj de I.P.R. (vidu 2-an kovrilpaĝon)
aŭ al la landaj perantoj kaj delegitoj de U.E.A.

PERANTOJ DE I. P. R.

BRITA : « *The British Esperanto Association* », 140, Holland Park Avenue, London, W 11.

Jarabono : 8 ŝilingoj.

BULGARA : Ivan H. KRESTANOF, str. 6 Septemvri, 2., Sofia.

Jarabono : 8 levoj.

DANA : « *Dansk Esperanto-Forlag* », Ingemannsvej 9, Aabyhof. (Cek-konto :16.295).

Jarabono : 8 kronoj.

GERMANA : Helmut ROSSLER, 22 b, *Hechtsheim bei Mainz*, Friedensstr. 15. Cek-konto : 43 357 Ludwigshafen/Rhein.

Jarabono : 4,8 germanaj markoj.

HISPANA : E. CALVET, Pl. Gral Sanjurjo, 7, Tarragona. (Konto n° 956-293 ĉe « Banco Espanol de Credito »).

Jarabono : 44 pesetoj.

ITALA : Eduardo ZUMBO, Via del Carmine, 4, Torino.

Jarabono : 700 liroj.

JUGOSLAVA : Josip VAJDLIH, Podolje 15, Zagreb. (Cekkonto : Cradska Stedisnica Zagreb, 406-606/I br 46 53).

Jarabono : 330 dinaroj.

NORVEGA : Erling HOLTEN, Leangen i Strinda.

Jarabono : 8,50 kronoj.

SOVET-UNIA : Roberto DVORKIN, Esperanto-Sekcio de Kulturdomo, Leningrad, 22, Kirovskij 42.

SUOMA : Joel VILKI, Somero, poŝtkonto : Tu 60 253.

Jarabono : 300 suomaj markoj.

SVEDA : « *Eldona Societo Esperanto* », Box 19071, Stockholm (Poŝtĉeka Konto : 578).

Jarabono : 6 kronoj.

USONA : Jarvis E. BUSH, 3.700 North 75-th Street, Milwaukee 16, Wisconsin.

*
**

ALIAJ LANDOJ : Sin turni al nia administranto : E. BMOIT, 6 rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.) Francio. (Poŝtĉeka konto : 143-867 Nantes). Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. peras la abonojn. Jarabono : 400 francaj frankoj aŭ egalvaloro.

Ni daŭre serĉas perantojn.

ESPERANTO KAJ KULTURO

Internacia Pedagogia Revuo

Redaktejo : D-ro ALBAULT, 11, rue des Feuillants, *Toulouse*, Francio.

Administrejo (abonoj, ktp.) : E. BIDOT, 6, rue de la Paix, *Baugé* (M.-et-L.), Francio

Eldonejo : H. MICARD, Emerita Instruisto, *Epineux-le-Séguin* (Mayenne), Francio.

Letero de Leganto

Tre estimata sinjoro redaktoro,

Mi tre ŝatas la aperon de internacia pedagogia revuo en Esperanto. Akceptante ke vi deziras kritikon pozitivan bonvolu permesi ke mi skribas al vi mian opinion nekompentan.

La artikoloj de M. Boulton kaj Rauh tre interesis min.

Sed bedaŭrinde mi trovas tiom da paĝoj sen pedagogia valoro : « Por la praktikantoj ». « Por la progresintoj ». « Tra nia literaturo ». « Konkurso ». « Por via distro ».

Mi opinias, ke la spaco en IPR estas tro altvalora por tio.

Ekzistas tiom da revuoj esperantaj en kiuj oni trovas sufiĉe da materialo por lernantoj aŭ distro-serĉantoj. En internacia *pedagogia* revuo mi serĉas nur artikolojn *pedagogiajn* ; ekzemple : originalaj kaj tradukitaj artikoloj ; resumoj de interesaj artikoloj el nacilingvaj pedagogiaj aŭ psikologiaj revuoj aŭ libroj.

Se mankas la kunlaborantoj vi povus peti de pedagogoj tiajn artikolojn aŭ almenaŭ resumojn.. Tiamaniere la IPR evoluigu al altvalora pedagogia revuo de vere internacia signifo !

Ekzistas alia internacia pedagogia revuo, la « International Review of Education — Revue Internationale de Pédagogie » (en lingvoj franca, angla kaj germana), fondita de la Unesko-Instituto por Pedagogio, eldonita de Bigelow (Nov-Jorko), Gal (Parizo), Langeveld (Utreĥto), Merck (Hamburgo), Schneider (Munkeno) ; eldonejo M. Nijhoff (Hago).

Tiu revuo havas la nomon « internacia », sed ĝi nur estas tri-lingva, sed valora, pedagogia revuo ; mi deziras kaj esperas, ke Internacia Pedagogia Revuo

estos baldaŭ la sola vera internacia pedagogia revuo.

Mi sendas al vi tri artikolojn de mi verkitajn. Se ili konvenas al vi, mi estus preta al kunlaboro. Sed mi devas atenti, ke mi ne estas lerta esperantisto (mi estas komencanto kaj mem-lernanto).

Esperante ke mia kritiko helpus al la plibonigo de IPR, mi restas kun koraj salutoj, via sindona

Herbert SCHULER (Sarlando).

RESPONDO DE LA REDAKCIO

Ne la kunlaborantoj mankas, nek la vere interesaj (pedagogiaj !) artikoloj. Kelkaj atendas jam de monatoj por aperi : ni petas pardonon de iliaj aŭtoroj. Bedaŭrinde mankas la spaco. La nombro da paĝoj dependas nur de la nombro da nefrancaj abonantoj kaj de la malavara subteno de niaj legantoj. Ni ne forgesu ke la financa bazo estis trovita per tio, ke G.E.E. konsentis ŝanĝi sian propran gazeton al internacia revuo cele al la superegaj interesoj de la movado.

Per tio ni riskas perdi francajn legantojn, kiuj, ŝajne, komencantoj en la lingvo, ŝatas legi simplajn tekstojn. Se ni perdas francajn legantojn, la revuo riskas perdi sufiĉan financon bazon por plu vivi.

Francaj kaj alilandaj legantoj, diru vian opinion kaj agu ! Ĉu la nuna formulo plaĉas al vi ? Ĉu male vi preferus pli da artikoloj, vere pedagogiaj ?

S-ano H. SCHULER pretigu la proponitajn artikolojn. Ili aperos, sed ne tuj. (Krome bonvole notu ke via afabla kritiko ne plu estas aktuala en siaj detaloj).

INFORMOJ

EKSPOZICIO DE TUTMONDAJ LERNOLIBROJ KAJ INFAN-GAZETOJ

En Barcelono oni intencas prepari « GRANVAN EKSPOZICION » de tutmondaj elementaj lernolibroj, grafik-historietoj, revuetoj kaj infangazetoj — propralingve verkitaĵoj, kaj pere de Esperanto atingitaj —, tre taŭgaj por la plena amuzigo de la universala geinfanaro.

Ni esperas do, de via bonkoreco kaj infanamo, ke vi bonvolos kunlabori al tiu pedagogia tasko, sendante al ni la cititan ĉiusepecan materialon. Certes, vi estos rekompenkataj per la sama procedo, t. e., kontraŭ la koresponda ricevado de simila kaj samvalora literaturaĵo.

Tutkoran antaŭdankon!

Bonvolu ĝentile sendi la ekzemplerojn al la Eldonejo.

Exclusivas durve, av. General Mitre, 176, Barcelona (Hispanio).

INFANDESEGNAĴOJ

La franca sekcio de I.F.E.F. (Internacia Fervoĵista Esperantista Federacio) intencas organizi en pluraj fervoĵaj centroj de Francio ekspozicion de infandeseĝnaĵoj, kies temo estos « La Fervoĵoj en la Mondo ».

La deseĝnaĵoj, preferinde koloritaj, havos formaton 25 x 31.

Ni petas speciale la ĝeinstruistojn inviti siajn ĝelernantojn desegni stacidomojn, trajnojn, lokomotivojn, pontojn, k.t.p.... kiel ili vidas ilin en siaj landoj.

Tiu ekspozicio helpos nin en nia propagando ĉe nia administracio, tiel ni esperas ke ĉiuj respondos amase al nia alvoko.

Franca Fervoĵista Esperanto Asocio, 11, rue de Milan, Paris 19^e.

Ekspozicion el infandeseĝoj deziras aranĝi: Vago Imre, instruisto en Pécs, Rudas László-u-21, Hungario.

LA LOTERIO DE LA UNIVERSALA KONGRESO

Kun la celo kuraĝigi la fruan aliĝadon, la Loka Kongresa Komitato decidis lotumi donacojn inter la unuaj mil kotizintaj kongresanoj.

La donacoj entute estas 36 kun suma valoro de ĉ. 50.000 fr. fr. L.K.K. oferas la unuajn tri donacojn, kiuj konsistas el stipendioj por restado en Marsejlo dum la Universala Kongreso: Ili estas personaj, netransdoneblaj kaj pagotaj nur al la venkinto je lia alveno en la kongresurbo dum la kongressemajno.

La aliajn 33 premiojn (ĉefverkoj de nia literaturo kaj abonoj al la plej gravaj internaciaj gazetoj en Esperanto) afable donacis: Universala Esperanto-Asocio, Heroldo de Esperanto, Universala Ligo, La Nica Literatura Revuo, Norda Prismo, Eldonejo « La Stafeto », Eldonejo « La Koko », Eldona Societo Esperanto.

La lotumado okazos antaŭ publika notario en Marsejlo tuj post atingo de la postulita nombro de aliĝoj kaj la rezultoj aperos en la esperantista gazetaro.

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario.

« GRAJNOJ EN VENTO »

La Tutmondaj Interlerneĵaj Rondoĵoj, Centro en Bienne - Biel, Svislando, alvokas la tutmondan Esperantistaron por urĝa financa helpo! Por la disvastigado de Esperanto ĉe la infanoj, por la venko de la internacia lingvo, por la Paco sur la Terglobo, ni akceptis grandegan taskon. En la momento, kiam multegaj leteroj alvenas ĉiutage al la Centro (tri rondoĵoj en elementaj lerneĵoj jam funkcias, du aliaj formiĝas), niaj elspezoj fariĝis nepre ne plu elteneblaj: Ju pli da rondoĵoj, ju pli da elspezoj! Modesta salaĵo de instruisto en popollernejo ne plu sufiĉas. Ĉar « Grajnoj en Vento » fariĝis entreprenado tutmonda, ĝi fariĝis ankaŭ via. Same kiel ni, vi deziras ties sukceson! Tiucele ni ĵus malfermis postĉekkonton: **N-ro IV a 9.485 « Grajnoj en Vento »**, Marcel Erbeta, rue des Pins, 66, **Biel - Bienne 7**, Svislando, Suisse.

Instruistoj! Ni kovru la tutan Terglobon per rondoĵoj « Grajnoj en Vento »! Sindonaj Esperantistoj kunlaboru al nia gravega entreprenado finance helpante!

La iniciatanto de la rondoĵoj:

Marcel ERBETTA,

instruisto en popollernejo.

PERESPERANTA KURSO DE FRANCA LINGVO

Post la kurso de franca lingvo en nia kulturdomo, ties direktoro ricevis de partopreninto la jenan leteron:

Tre estimata Sinjoro Micard,

Lunde matene je la 7a mi bone alvenis hejmen kaj komencis tuj labori. Sed ofte ĝi miaj pensoj ne plu estis je la laboro, mi vidis la Grésillon'an rondon kaj la laboro forgesigis. Mia patrono nur ridetis, li povis kompreni. Sed nun mi jam alĉiutimigis al la ĉiutaga vivo kaj mi laboras nun pli volonte, ĉar mi scias, ke ekzistas loko, kien mi ĉiam povas reveni kaj ripozi kaj resti inter samideanaj amikoj.

Kun ambaŭ kursoj mi estis tre kontenta, niaj instruistoj sukcesis faciligi al mi la malfacilaĵojn de via lingvo. Mi opinias, ke la kurso estis same interesa por la progresantoj — ili povis kelkion ripeti — dum ni komencantoj multe lernis. Antaŭe mi estis skeptika, ĉu eblas instrui fremdajn lingvojn per Esperanto, sed en Grésillon mi tute forgesis, ke ne estis germanaj, sed esperantaj klarigoj. Mi nur esperas kaj deziras, ke la venontan jaron pli multaj Esperantistoj uzos tiun bonan eblecon perfektigi franclingve.

La praktika kurso kompreneble estis por mi la pli valora, ĉar mi devis paroli rekte en la franca lingvo, ne pensinte pri la germanaj esprimoj. Kaj ĉefe la ludoj enkondukis min en la francan temperamenton kaj parolmanieron, ĉar kiam oni vidas kaj aŭdas paroli la francojn, tiam la tuta lingvo faciligas kaj encerbiĝas. Mi ankaŭ lernis multe, nur aŭdante kaj ne komprenante.

Mi ankoraŭ kore dankas al vi kaj al via edzino, mi ankaŭ salutas ĉiujn feliĉulojn kiuj ankoraŭ povas resti en la kulturdomo kaj deziras al la nunaj renkontiĝoj plenan sukceson.

I. BREDDERMANN.

F. Cadenel

Submezaj Infanoj ⁽¹⁾

SIMPLIGITA KLASIFO. — Resume, oni povas aserti, ke la infanoj povas esti normalaj

1° korpe, kriplaj, malfortikaj, malsanaj;

2° karaktere kaj socie : nestabilaj, emociemaj, malvirtaj, perversaj;

3° intelekte debilaj, malfruaj, sed ankaŭ frumaturaj.

Ni ne skribos pri la mirinfanoj, supermezuloj, riĉe dotitaj de la sorto. La frulojn estas preferinde aparte arigi; oni evitas al ili tempoperdon por atendi kamaradojn malpli dotitajn. Ĉi-tiu artikolo temas pri la submezuloj kaj infanoj dangeŝraj por la lernejaj societoj.

La kripletaj geknaboj povas vizitadi la lernejojn : la instruistoj patre prigardas ilin. Sed fakaj klasoj por duonsurduloj aŭ balbutuloj tre utilas por ĉi tiuj malfavoratoj. De longe funkcias lernejoj por blinduloj kaj surdmutuloj, kaj nun oni kreas lernejojn por « ambliopuloj » (2).

La malfortikuloj bezonas higienan, varian, apetitigan nutraĵon. La kursoj sub libera ĉielo, kun malmultaj laborhoroj, intermitigitaj per oftaj paŭzoj, en kamparaj internejoj bone taŭgas por ili.

Kelkaj sanatorioj por tuberkulozaj infanoj enhavas specialajn klasoĉambrojn.

Nestabilaj, emociemaj kaj malvirtaj bezonas fakajn kuracistojn kaj apartan kuracadon; ili estas perfektigeblaj. Ofte oni povas miksi ilin, same kiel la maldiligentajn, kun normaluloj; la edukisto estos tre pacienca kontraŭ la nestabilaj, kaj atente prigardos la malvirtajn. La perversaj, tre malmultaj, malofte estas plibonigeblaj.

La idiotoj sukcesas nek parole esprimi sian penson, nek kompreni la aliulan penson ĉar ili ne atingas mensan aĝon de du jaroj; la « imbeciloj » povas nek esprimi sian penson per la skribado, nek kompreni kion ili legas, ĉar ili ne atingas mensan aĝon de sep jaroj; idiotoj kaj imbeciloj estas malmultaj en la lernejoj, kiuj ja ne povas akcepti la unuajn; escepte oni enskribas la duajn. Sed preskaŭ ĉiam la lernejestroj akceptas la « debilulojn », tio estas infanoj, kies lerneja malfruo estas dujara, kiam ili ne estas ankoraŭ naujaruloj, kaj tri jaroj kaj pli, kiam ili estas pli ol naujaruloj. Por ili, estis kreitaj specialaj klasoj nomitaj « por submezuloj » aŭ, eufemisme, « perfektigaj klasoj ».

La malfruiĝintoj estas infanoj malpli dotitaj ol la mezuloj, aŭ malpli laboremaj, aŭ ofte malsanaj, aŭ ofte forestan-

taj, kiuj malfacile profitas la instruadon kaj ofte restas du jarojn en la sama klaso. Fakaj klasoj, sufiĉe ofte ebligas regajni, « rekuperi » (3) ilin; tialn klasojn ni nomos « rekaptoklasoj ».

PREPARADO DE LA EDUKISTOJ GVIDANTAJ KLASOJN POR SUBMEZULOJ. — Krom sufiĉa ĝenerala kulturo, tiuj edukistoj bezonas ankaŭ :

a) fakan preparadon, konon de specialaj psikiatrio, psikologio kaj pedagogio, de lerneja higieno, de ortopediaj mezuroj, konon de anatomio kaj fiziologio de la parolorganoj, de la kuracado de la prononcdifektoj, konon de la legaro por submezuloj kaj ankaŭ de la ekonomiaj kaj sociaj institucioj, kiuj patronas la nenormalulojn;

b) teknikan preparadon, lernadon de almenaŭ unu speco de manlaboro por komencigi la metilernadon de la infanoj;

c) praktikan preparadon, kiun ili akros dum restado en institutoj. (4)

GENERALAJ PRINCIPOJ POR LA GVIDADO DE LA PERFEKTIGOKLASOJ KAJ REKAPTOKLASOJ.

A) *Generalaj konsiloj.* — La lernado speciale destinita al la submezaj infanoj postulas pli da movado kaj manlaboro, malpli da paroloj, pli ofta kaj daŭra uzo de la intuicio ol tiu destinata al la mezuloj.

Oni devas ne peti de la socio, ke ĝi donu al la submezuloj ilian vivrimedon.

1) Ĉi tiu artikolo estas la traduko de la ĉapitro « Les enfants anormaux » el la « *Memento de pédagogie pratique* », de F. CADENEL. Ni dankas la eldoniston, S-ro MAGNARD, kiu afable permesas la reprodukon de ĉi-tiu traduko.

2) « *Ambliopo* » (= G. *ambliös*, obtuza; ops, okulo). Sana okulo estas « ambliopa », kiam ĝi tre malbone vidas, t.e. kiam ĝia vidaĵo estas malpli ol 2/10, malgraŭ la konvena okulvitro. Ambliopaj okuloj estas troveblaj precipe inter la forte miopaj aŭ forte astigmaj kaj ankaŭ ĉe diversaj afekcioj, kiel strabo (ambliopeco « ex anopsia », t.e. pro neuzo)...

Ambliopulo estas homo kies ambaŭ okuloj estas ambliopaj.

3) « *Rekuperi* »; = F. : *recupérer*; = H. : *recuperar*; = A. : *recuperate*; — regajni ion ŝajne perditan per aparta rimedo aŭ tekniko.

sed ke ĝi instruu metion, por ke ili mem gajnu sian vivrimedon; leĝaro evitos, ke senskrupulaj mastroj ekspluatu ilin.

Necesos krei, por ili, multajn kromlernajn instituciojn, senpagajn kantinojn, vartejojn, kamparlaborgrupojn, disdonon de kuraciloj kaj vestoj, por kompensi la senzorgecon kaj malkapablecon de la sociaj medioj, de kiuj ili devenas.

B) *Principoj*. — 1° Ne perdi tempon, senĉese okupi la lernantojn per utila laboro, devas esti por la edukisto vera obsedo.

2° Organizi tempouzon laŭ proponita horaro kaj skrupule respekti ĝin post adaptado al la lernantoj. Sen neglekti la lingvo-ekzercadojn aŭ la lernadon de intuicia kalkulo, doni grandan lokon al la edukado de la sensoj kaj atento al la manlaboro, al la desegno; uzi opajn kaj individuajn ludojn, kantadon, promenadon, gimnastikon; respekti la paŭzojn.

3° Zorgege pretigi la klason. Antaŭprepari ĉiujn taskojn, kiujn la infanoj devos plenumi sub la gardo kaj kontrolo de la instruisto. Antaŭe pripensi, disponi, aranĝi, kion ĉiu grupo, ĉiu infano devos fari, laŭ la malfacilaĵoj, el kiuj ili devos elturniĝi. Distribui tute pretan materialon. Adapti la lernadon al la infanoj. Ne forgesi, ke la klasnivelo ĉiujare ŝanĝiĝis. Prepari ĉiufoje, kiam eblas, opajn lecionojn zorgante, ke ĉiu infano kiel eble plej profitu.

4° Uzi procedojn taŭgajn por atentigi la lernantojn;

a) Stimuli la atenton de la apatiuloj, fiksi la atenton de la nestabiluloj precipe per ludoj multaj kaj variaj (5).

b) Uzi simplan, rektan, sobran, ekzaktan lingvon kaj frazojn kun malmultaj subordigaj propozicioj aŭ parentezoj. Memori, ke ĉio, kion oni diras, gravas malpli ol ĉio, kion diras la lernantoj; nur valoras, kio estas dirita de la infano. Korrekti per senlaca pacienco la prononcdifektojn kaj la sintakserarojn. Bildoj kaj desegnoj faritaj de la instruisto aŭ lernantoj multe helpas.

c) Manipuligi objektojn. Uzegi intuicion kaj konkretaĵojn. Eduki la sensojn (vidon, audon, flaron, guston, palpon, muskolsenson) per multaj kaj variaj ludoj.

d) Necese gas laborigi la infanon, por ke korpe kaj mane ili agu. « La lernado ne konsistas el maksimumoj, sed el ekzercoj. » (J. J. ROUSSEAU). Ne demandi al si « Pri kio mi parolos? » sed « Kion mi farigos? ».

e) Desegnigi, uzi la manlaboron. Ofte uzi specialajn ludilojn por instrui la legadon, ortografion, kalkulon.

5° La ripetado estas instrunepraĵo. Fokusi la lernadon ĉirkaŭ temoj, kiuj eblis

gas la ripetojn kaj ideasociojn. Postuli la ripetadon ĝis plena sukceso.

6° Komprenigi, klarigi, sed ankaŭ akirigi la necesegajn meĥanismojn.

7° Senĉese kontroli. Doni ekzemplojn de senhalta agado. Konstante kaj samtempe kvietigi, stimuli, kontroli, observi ĉiun infanon.

Ne iluziĝi pri la valoro de la trafota rezulto.

8° Ne neglekti la moraledukadon de la nenormaluloj; uzi dresadon, sugeston, vokon al bonkoro, aŭ kiam eblas, al racio.

9° Ĉiutage kaj singarde korpe trejni la infanojn. La spiraj ekzercoj ĉiam utilos, same kiel la ekvilibraj (stari aŭ salti per nur unu kruro, marŝi sur mallarĝa bendo, sur malalta trabo; porti objektojn sur la kapo, skatolojn da akvo de loko al alia, ĵongli); Ankaŭ facilaj nesimetriaĵoj movadoj estas rekomendindaj.

Grava rimarko. La plimulto de la ĝeneralaj principoj por la eduko de la nenormalaj infanoj estos uzataj kun la plej granda profito por la normalaj infanoj.

BIBLIOGRAFIO. — Mi citos nur:

1° la esplorojn kaj prelegojn de Doktoroj BINET kaj SIMON.

2° de la samaj « *La mesure du développement de l'intelligence chez les jeunes enfants* » (Eldonisto, BOURRELIÈRE).

3° « *L'enfance irrégulière* » de BOURRAT, DECHAUME, GALLAVARDIN kaj aliuloj. (Eldonisto, *Presses universitaires de France*).

4° « *Les enfants inadaptés et l'école primaire* ». Cahier de pédagogie moderne (Eldonisto, Bourrelier).

(Tradukis F. CADENEL

kun la kunlaboro de D-ro ALBAULT kaj S-ro SARETTO).

4) En Francujo, ĉiujare, kursoj, kiuj daŭras ses monatojn, estas organizataj en *Beaumont-sur-Oise*. Mi konsilas al la ĝenestruiroj, kiuj deziras viziti ilin, konigi sian deziron al sia inspektoro, tuj ĉe la komenco de la lernjaro.

5) Mi rekomendas la « *Kim* »-ludojn. Ekz.: for de la ĉeesto de la lernantoj, kaŝu kelkajn aĵojn sub stofpeco; loku la geknabojn ĉirkaŭe, malkovru dum kelkaj sekundoj, denove kaŝu; la infanoj diros aŭ skribos la liston de aĵoj.

La nombro de la aĵoj kaj la tempo, dum kiu la edukisto malkovros ilin, varias laŭ la trejniteco de la lernantoj. La objektoj povos ŝajne simili unu la alian, kaj la infanoj devos rimarki la diferencojn. Unuafoje montrinte la aĵojn, oni povos, petinte la infanojn fermi la okulojn aŭ turni la dorson, aldoni, forigi, aŭ alilokigi aĵojn aŭ substitui unu per alia, kaj poste duafoje oni malkovros antaŭ la okuloj de la lernantoj, kiuj diros la faritajn ŝanĝojn. La aĵojn, oni povos anstataŭi per bildoj, literoj, etikedvortoj, ciferoj, nombroj, ktp. Komprenoble la malfacileco de la observekzercado estas adaptita laŭ la kapabloj de la infanoj.

Atanas D. Atanasav — Ada

LERNU KAJ INSTRUU



Dua Leciono

Rekapitulacio de la Elementoj de la Esperanta Gramatiko Lernitaj en Kurso por Komencantoj (Daŭrigo)

VORTFORMADO

RADIKO		+	FINAJO		
Bon	—		A		
Knab	—		O		
Lern	—		AS		
Diligent	—		E		
Bona knabo lernas diligente					
PREFIKSO		+	RADIKO	+	FINAJO
Mal	—		Diligent	—	A
Mal	—		Bon	—	O
Mal	—		Lev	—	I
RADIKO		+	SUFIKSO	+	FINAJO
Patr	—		in	—	o
RADIKO		+	RADIKO	+	FINAJO
Klas	—		ĉambr	—	o

Ce la kombinitaj (du- kaj plurradikaj) vortoj la lasta radiko entenas la bazan (ĝeneralan) ideon de la vorto; la antaŭa radiko difinas ĝian kvaliton (kiacon): klasĉambro = klasa ĉambro; florgardeno = flora ĝardeno; ĝardeno de floroj (diference al fruktoĝardeno, legomĝardeno); ĝardenfloro = ĝardena floro (floro, kiu estas kulturata en ĝardenoj — diference al kampfloro, arbara floro).

KampOflorO: la unua radiko havas ankaŭ finaĵon por eŭfonio (belsoneco) kaj por pli facila elparolo; oni malfacile povas elparoli « kampfloro ». Same: akvofalo (anstataŭ akvfalo) k.a.

Unuagrada, duagrada.

VERBO

Formoj de *sendifina modo* (infinitivo) -I kaj de *vola modo* (volitivo) -U.

INFINITIVO.

Kompletigas la sencon de alia verbo (komplemento en verba formo):

Mi volas panon.

Mi volas manĝi.

Mi volas manĝi panon.

Mi povas tion.

Mi povas paroli.

Mi povas paroli esperante (aŭ: esperanton).

Infinitivo en funkcio de subjekto gramatika: rajdi sur leono estas danĝere.

VOLITIVO.

Prenu la libron. Malfermu ĝin. Trovu la kvardeksekan paĝon. Legu la tekston. Fermu la libron.

Ni komencu nian lecionon. Li venu sola. Ili sciu, ke mi ne toleros ŝercojn.

PRONOMOJ

POSEDA, kiam akompanas substantivon, estas uzata sen artikolo; kiam ĝi estas memstara (efektiva pronomo — anstataŭanto de nomo, de substantivo), estas uzata kun artikolo:

Mia kraĵono estas nigra, la via estas ruĝa.

Nia domo estas malgranda, la ilia estas pli granda.

RESENDATA: Si, sin (kaj la respektiva poseda: sia).

Noto. — La resendata pronomo estas aparte klarigenda al okcidenteŭropanoj, kiuj ofte uzas, ekz. *sia patro* anstataŭ *lia patro* (si, sia, ne povas esti subjekto). Kontraŭe la slavojn oni devas atentigi, ke tiu ĉi pronomo ne estas uzebla por la unua kaj dua personoj; la ĝenerala uzo de la resendata pronomo por ĉiuj personoj en la slavaj lingvoj logas iam novajn esperantistojn en la slavaj landoj paroli « Mi vidas sin ».

2. Atentigu la lernantojn pri la kazo de reciprokeco ĉe la uzo de la resendata pronomo (kiam ĝi signifas ne *sin mem*, sed *unu la alian, reciproke*): ili ofte renkontas sin. Ili neniam vidis sin. (Respektive la kazojn: ni amas nin, ni renkontas nin).

PERSONA NEDIFINITA: Oni. (Oni diras, oni pensas).

ADVERBO

Ĉiu adverbo povas esti anstataŭata per vortkomplekso:

Prepozicio kun substantivo:

Rapide — laŭ rapida maniero.

Laŭte — kun (per) laŭta voĉo, sono.

Supre — sur la supro, sur (en) la supra parto.

Hejme — en la hejmo.

Nokte — dum la nokto.

Somere — en (dum) somero.

Multe — en multa kvanto, en granda grado.

Adverboj nederivitaj de radikoj: kun finaĵo -Aŭ (hodiaŭ, morgaŭ, preskaŭ, ktp.) kaj kelkaj aliaj: nur, tre, tro. El ili povas esti formataj aliaj gramatikaj kategorioj per aldono de respektivaj finaĵoj: hodiaŭa, morgaŭo, nura, ktp.

NUMERALOJ

Derivaĵoj pere de sufiksoj -obl, -on, op.

OBL: duobla, triobla, ktp. (Kiomfoje estas prenata io, kiomfoje ĝi ripetiĝas).

Sesoble kvin.

La sesoblo de kvin.

ON: duona, duono, triono..., dudekvinono, ktp.

Duona pomo = duono da pomo (en tiu ĉi kazo *duono* esprimas mezuron; ni povas diri « duono de pomo », kiam ne estas akcentata la senco de kvanteco).

OP: duope, triope, ktp.

Ni restis duope. Ili marŝas kvarope en vico (en ĉiu vico, linio estas kvar personoj).

PO: distribua prepozicio: al ĉiuj po unu pomo (ĉiu devas ricevi unu pomon). Potage = por ĉiu tago, pomonate: pagi kvin « stelojn » pomonate.

KORELATIVAJ VORTETOJ

K — kio, kiu, kia, kie, kiel, kiam, kiom.

T — tio, tiu, tia, tie, tiel, tiam, tiom.

C — ĉio, ĉiu, ĉia, ĉie, ĉiel, ĉiam, ĉiom.

Ĉi estas uzata, kiam estas necese diferencigi objektojn, el kiuj unuj estas pli proksimaj kaj aliaj pli malproksimaj: tiu ĉi, tio ĉi, tie ĉi; ankaŭ: ĉi-tio, ĉi-tiu, ĉi-tie.

Aparta kazo de mallongigo: ĉio ĉi (ĉio ĉi-tio), ĉiuj ĉi faktoj, kaj ankaŭ: ĉi-vespere, ĉi-homo.

MODALECAJ ESPRIMOJ

Li rapidas. Li marŝas rapide. Lia iro (marŝo) estas rapida. Li iras kun rapida marŝo.

Vi legas tre mallaŭte. Via lego estas tre mallaŭta.

ARTIKOLO

La artikolo konkretigas kaj individuigas; ĝi montras ne *kiun ajn* el kelkaj, sed precize difinitan, sciatan.

Substantivo, uzita sen artikolo, estas proksima laŭ senco al IU — (kiu ajn, kelka, kelkaj).

Donu al mi kraĵonon (kiun ajn el la kraĵoj, ne gravas kiun precize).

Donu al mi la kraĵonon. (Ni jam scias pri kiu kraĵo ĝuste temas).

Mi bezonas adreson de instruisto. (De kiu ajn instruisto).

Mi bezonas la adreson de la instruisto. (Ni scias precize pri kiu instruisto nome temas).

Esperantistoj (iuj, kelkaj) subtenis la delegitaron.

La esperantistoj (ĉiuj) subtenis la delegitaron.

Egale direblaj :

Rozo estas floro = La rozo estas floro. (Rozo ĝenerale, rozo kiel speco de vegetaĵo, ĉiu rozo, kiu ajn rozo estas floro).

Rozo estas simbolo de la amo = La rozo estas la simbolo de la amo.

AFIKSOJ

ET : knabeto, beleta, dormeti.

EG : manego, grandega, ridegi.

IL : razilo, hakilo, gladilo, komprenilo.

ELPAROLO KAJ AKCENTO

La lernantoj devas ekkutimiĝi jam en la unuaj lecionoj elparoli klare ĉiujn sonojn, speciale la vokalojn, sen malfortigo de apartaj, sen malklarigo, redukto k. sim., ankaŭ sen longigo de certaj vokaloj.

Ce elparolo de vortoj formitaj el du aŭ pluraj radikoj estas bone komprenigi per la voĉo kie finiĝas unu kaj kie komenciĝas la sekvanta radiko, uzante la tielnomatajn *duonakcentojn* : florigardeno (ĉe *flor* estas sentata malforta akcento, post tiu radiko estas momenta ekhalto de la voĉo, la ĝenerala akcento de la tuta vorto estas sur la silabo DE).

Por kelkaj nacioj oni devas atentigi speciale la akcentadon ĉe vortoj kun finaj silaboj -IO, (-IA, -II) kaj -TORO : nacio, socia, asocia, direktoro, profesoro, ktp...

Ofte Hungaroj (kaj iam ankaŭ Ĉeĥoj) sub influo de sia nacia lingvo emas akcenti la komencan silabon de la vortoj : BULgara, HUNgara, KONgreso. La instruantoj de Esperanto en Hungario devas jam en la komenco atentigi la lernantojn pri tio kaj kutimigi ilin al bona akcentado. Foje ankaŭ francaj esperantistoj emas akcenti la lastajn silabojn de la vorto.

EKZEMPLOJ KAJ TIPAJ FRAZOJ

VORTFORMADO : Vaporŝipkompanidirektoreldzino. (Difinu la bazan radikon kaj klarigu kiu el la ceteraj radikoj kiun radikon difinas). (*)

VOLITIVO : Ne diru « hop » antaŭ la salto.

SI : Li vidas en la spegulo sin kaj lin.

Multaj esperantistoj renkontos sin en la kongreso.

ONI : Al la buŝo de « oni » neniu povas ordoni.

OBL : Rapida helpo — Duobla helpo. Duoble donas, kiu donas ĝustatempe.

Kiom estas sepoble ok ?

ON : Komenco bona — laboro duona.

OP : Akiro kaj perdo rajdas duope.

ET kaj EG : Oni komencas per ŝteleto kaj finas per ŝtelego.

IL : Ora ŝlosilo ĉiun pordon malfermas.

EKZERCOJ

1. — *Kompletigu la sekvantajn frazojn :*

Marko volis ... vian onklon, sed via onklo ne povis ...

Mi povas ... nur panon, sed vi ne deziras ... al mi eĉ panon.

Kiam vi komencos ... ?

Kiam ni finos ... (i) ? Kiam ni finos la ... (on) ?

Hodiaŭ ne estas tempo ...

2. — *Kompletigu per lin, sin, ŝin, ĝin la sekvantajn frazojn :*

Li havas ... Li amas ... Ŝi kombas ... Ili levas ... Kiu estimas ..., tiu ne entreprenos tian agon.

3. — *Kompletigu la sekvantajn frazojn :*

Mi prenas mian libron. Vi prenas ... libron, kaj li prenas ankaŭ la ...


Ni vidis ... en la spegulo.

Ni serĉos ... ĉe la angulo de la strato. Ili trovos ... en la teatro.

* Komprenble temas pri ekzerco (aŭ ŝerco) neniel imitota en la ordinara lingvo. — Red.

NI LERNU PER BILDOJ

EN LA SALONO



- | | | |
|----------------------|------------------|--|
| 1. la tableto. | 7. la kanapo. | 6. — La infano, kiu sidas sur la tapiŝo aŭskultas la radion. |
| 2. la radiatoro. | 8. la katino. | 7. — La katino rigardas la infanon. |
| 3. la radio-aparato. | 9. la pordo. | 8. — La infano, kiun la katino rigardas, estas juna. |
| 4. la fotelo. | 10. la fenestro. | |
| 5. la piano. | 11. la lamparo. | |
| 6. la foto. | 12. la infano. | |

1. — Estas unu piano apud la pordo.
2. — Estas du foteloj kaj tri fotoj.
3. — La lamparo, kiu pendas de la plafono, konsistas el kvar lampoj.
4. — La kanapo, kiu estas sub la fenestro estas komforta.
5. — La infano kelkfoje ludas per piano.

Demandoj :

- Kiu sidas sur la tapiŝo ? La infano sidas sur la tapiŝo.
- Kiu rigardas la infanon ? La katino rigardas la infanon.
- Kiun rigardas la katino ? la infanon rigardas la katino.
- Kiom da foteloj estas en la salono ? Estas du foteloj.

SKIU CI-VINTRE

INTERNACIAJ SKISEMAJNOJ DE T. E. J. O. 1956-57


Ankaŭ ĉi-tium jaron TEJO organizas skirenkontigon, kiu okazos de la 26-a de decembro 1956-a ĝis la 6-a de januaro 1957-a en la montara vilaĝeto Dienten ce « Hochkonig » en la aŭstra liglando Salzburg.

La prezo por la tuta tempo estas 400. — aŭstr. ŝil. ; por ĉiu tago malpli, oni pagas 35. aŭstr. ŝil. malpli. Oni povas antaŭpagi al la ĝirkonto 12-201 ĉe « Salzburger Sparkasse », Salzburg, Aŭstrujo ; sed antaŭpago ne estas postulata.

Aliĝojn oni sendu plejeble baldaŭ al la gvidanto : s-ano Heinrich REITER, Salzburg, I. 557. Ĉar la limnombro por aliĝoj estas 55, tuja aliĝo estas plej oportuna. Ĉiu aliĝinto ricevos detalan cirkuleron ; dezirante ricevi pliajn scigojn oni nepre aldonu internacian respondkuponon. Por aliĝo sufiĉas simpla poŝtkarto aŭ letero kun : nomo, adreso, ago, sekso, metio.


patrino — sur la —.
 infano kuŝas — la —.
 patrino — rigardas la —.

la katino staras sur la kanapo?
 sidas sur la kanapo?
 kuŝas la katino?




radio-aparato — sur la —.
 infano aŭskultas la —.
 aparato estas — la planko.

radio-aparato estas sur la planko?
 aŭskultas la radion?
 da personoj estas sur la bildo?



katino rigardas la —.
 fotelo staras — la fenestro.
 katino sidas — la fotelo.

la katino rigardas la fotelon?
 da fenestroj estas en la ĉambro?
 staras la fotelo?



lamparo pendas — la —.
 patrino rigardas la —.
 patrino staras — la tablo.

sidas la infano?
 rigardas la infanon?
 rigardas la patrino?



F. Nouljan.

La Komenco de Internacia Pedagogia Revuo

Antaŭ la 2-a U. K. en Genevo la ĵurnalo « *Esperanto* » la 19-an de Aŭgusto 1906 (n-ro 23) publikigis la jenan alvokon : « Al Instruistoj Kongresanoj. Estus tre utile, se povus kunveni kaj reciproke konatigi kolegoj instruistoj, kiuj ĉeestos en la dua kongreso. Multego da grava kaj preparolinda materialo certe ne mankos. Tiel efektiviĝus la 1-a internacia kongreso de instruistoj esperantistoj. Kolegoj, kiuj intencas partopreni en tiu kunveno, volu tuj sendi sian adreson kaj proponon al Theodor CEJKA, instruisto en Bystrice — Holstyn, Moravio, Aŭstrio. Anoncis sin kvin geinstruistoj, kaj la kunveno ne okazis.

En la oficialan programon de specialaj kunsidoj dum la 3-a Esp. Kongreso en Kembriĝo, 1907, estis metita « kunsido internacia de instruistoj ». Ĝi okazis la 14-an de Aŭgusto 1907 en Guildhall. Ĉeestis pli ol 50 personoj, kiuj reprezentis geinstruistaron anglan, belgan, ceĥan, franĉan, germanan, nederlandan, rusan, kaj skotlandan. Prezidis MARECHAL, profesoro el Leeds (Anglujo). Oni decidis fondi la « Internacian Asocion de Instruistoj » kun la organo « Internacia Pedagogia Revuo ».

Dum la 4-a esp. kongreso en Dresdeno, 1908 okazis kvar kunsidoj de instruistoj, kiujn ĉeestis ĝis 200 personoj, inter kiuj estis reprezentantoj de geinstruistoj el Anglujo, Aŭstrio, Belgujo, Ĉeĥujo, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Moravio, Nederlando, Norvegujo, Polujo, Rumanujo, Rusujo, Serbujo, Siberio, Skotlando, Svedujo kaj Tunizio. Prezidis prof. Marechal (Anglujo). Estis aprobita la regularo de la « Internacia Asocio de Instruistoj » kaj elektita ĝia komitato : D-ro E. BORRAC, rektoro de la Universitato Dijono en Francujo (honora prezidanto) ; Th. CART, profesoro de la Universitato Parizo (prezidanto) ; F. MARECHAL, profesoro el Leeds en Anglujo ; f-ino de CHALMET el Hago en Nederlando kaj R. FRENKEL, inspektoro de gimnazio el Enisejsk en Siberio (vicprezidantoj) ; F. DURIEUX, direktoro de lernejo el Lille en Francujo (sekretario) ; Th. CEJKA, instruisto el Bystrice-Hostyn en Moravio (kasisto) ; F. AVILOV, estro de reala lernejo el Kars en Rusujo ; ing. E. BACKHEUSER, profesoro de politeknika lernejo el Rio de Janeiro en Brazilo ; d-ro W. CLARK el Arborfield en Anglujo ; K. SCHONHERR, instruisto en Dresdeno en Germanujo, kaj O. SIMON, profesoro de gimnazio el Vieno en Aŭstrio. Poste sekvis longaj diskutoj pri la « Internacia diploma de kapableco instrui Esperanton ».

Du kunsidoj, kiujn ĉeestis po ĉirkaŭ 170 geinstruistoj, estis dediĉataj al la demando de oficiala enkonduko de Esperanto en la lernejojn, al la pedagogiaj kaj didaktitaj demandoj. Estis farataj du provlecionoj kun infanoj. Post ili, ekestis tre interesa diskutado pri diversaj metodoj kaj procedoj instrui Esperanton, nome pri la plej bona maniero meti demandojn al infanoj. Fine oni decidis, ke la unua kajero de la perioda « Internacia Pedagogia Revuo », oficiala organo de I.A.I., eliru kiel eble plej baldaŭ. S-ro CEJKA estis komisiita per la direktado kaj eldonado de I.P.R. Al la asocio aliĝis kaj tuj pagis la kotizon pli ol 70 asocioj. La kotizo estis 2,50 frankoj jare. La anoj ricevos la revuon senpage.

La 1-a n-ro de I.P.R. aperis en Novembro 1908 en Bystrice-Hostyn, Moravio (Aŭstrio), sub redakto de Theodor CEJKA. Ĝi publikigas la nomojn de konstantaj korespondantoj en : Anglujo, Aŭstrujo, Belgujo, Ĉeĥujo, Finnlando, Francujo, Galicio, Germanujo, Hispanujo, Italujo, Montenegro, Moravio, Nederlando, Norvejo, Polujo, Rusujo, Serbujo, Siberio, Skotlando. En la enkonduko sub la titolo « Al nia celo » la redaktoro fiksas la programon kaj diras :

« Nun ankoraŭ kelke da vortoj pri la programo de la « Internacia Pedagogia Revuo » (I.P.R.) Ĝia enhavo konsistos precipe el tiuj ĉi fakoj : 1. Artikoloj pedagogiaj aŭ tuŝantaj la demandojn, kiuj rilatas la aferojn pedagogiajn. 2. Lernejoj kaj geinstruistaro. 3. Internacia Asocio de Instruistoj. 4. Internacia Oficejo por Instruantoj de Esperanto (raportoj, diversaj informoj, ktp.). 5. Literaturo : a) pedagogia ; b) scienca ; c) por gejunularo. 6. Revuo de Revuoj (dediĉita precipe al gazetara literaturo pedagogia). 7. Notoj kaj informoj. 8. Diskutejo (sole por la aferoj, kiuj rilatas iel la demandojn profesiajn aŭ pedagogiajn k. s.). 9. Korespondado de geinstruistoj. 10. Adresaro de gejunuloj, kiuj deziras korespondadi. La revuo alportados ne nur artikolojn originalajn, verkitajn speciale por ĝi, sed ankaŭ tradukojn kaj ekstraktojn de gravaj kaj internacie interesaj artikoloj kaj sciigoj, kiuj estis publikigitaj en la plej bonaj pedagogiaj revuoj diverslingvaj. En la fako literatura ni raportos pri la plej gravaj verkoj diverslingvaj, kiuj povas iel utili al profesiaj laboroj de instruistoj. Por ke ni konu nin reciproke kaj povu helpi unu la alian, precipe en aferoj specialaj, preskaŭ ĉiu kajero de la revuo enhavos en la fako « Korespondado » sciigojn de diverslandaj kolegoj, kiuj serĉas

proponas ĉu korespondadon ĉu helpon en la aferoj, kiuj postulas reciprohelpon de specialistoj. Tiu ĉi rubrikostas tre grava precipe por kolegoj istoj k. a. »

menziologo Jesef KRUMPHOLE en la 2-a n-roj, sub titolo « Ideo de J.A. COMENIUS pri lingvo universala », publikigis sciencan studon pri Johannes AMOS COMENIUS (Komensky, 1592-1671), filozofpedagogo, enciklopediisto, « instruisto de la popolo » kaj pliboniganto de la instruado, kiu pli ol 30 jarojn okupis sin kun la ideo de artefarota lingvo universala kaj skribis pri ĝi en siaj plej gravaj verkoj post la jaro 1671. Li kolektis bezonatan materialon por la historio de la internacia lingvo. En la 2-a n-ro li publikigis malnovan artistan portreton de J.A. COMENIUS kun valoraj notoj. En la 4-a n-ro li parolas pri la scienca eldono de ĉiuj verkoj de J.A. COMENIUS eldonotaj en 30 volumoj de la Internacia Asocio de ĉeĥaj societoj geinstruistoj » sub redaktado de J. KVÁČALA, de la universitato en Jurjev (Dorpat-Rusujo). La unua volumo ĵus tiam aperis.

La artikolo de la 2-a n-ro estas « Novaj lernejoj » de prof. A. FERRIER, traduko de prof. J. W. EGGLETON, pripraktikas tiam tre aktualan temon. La sama aŭtoro kaj la sama tradukinto en la 3-a kaj 4-a n-roj trovigas la artikolon « Kunedukado ». Ĝi estas kvazaŭ la artikolo kaj pritrakto de la unua artikolo kaj pritrakto de la unua artikolo, kiu hodiaŭ ne jam estas solvita. En la 3-a n-ro estas publikigita originala studo de Stanislas TOMIĆ : « Principoj de edukado de Povo ». Sekundara artikolo : « La gepatroj kaj la edukado de la japana infanaro en la familio ». Artikolo de « Revue des deux mondes » tradukita de prof. M. J. WESSEL. La sama artikolo tradukis ankaŭ historian skizon pri edukado kaj instruado en japanaj lernejoj de prof. d-ro K. YOSHIDA, kiu aperis en la 4-a n-ro.

Ĉi tiu artikolo pri instruaj kaj interesaj estas la artikolo pri lernejoj, instruistoj kaj edukado en diversaj landoj. Mi citos iliajn titolojn : La instruado en Nederlando. La instruistoj en Skotlando. La instruado en Danujo. La instruistoj en Belgio. La populaj lernejoj en la kamparaj vilaĝoj. Lernejo kaj instruistoj en Japanujo. La populaj lernejoj en Rusujo. Lernejo kaj instruistoj en Saksujo. La populaj lernejoj en Kroatujo. La instruado en Danujo. Administrado kaj inspektado de la saksaj lernejoj. La instruado en Kroatujo. Elementa lernejo en Bulgario. La manlaboro en germanaj lernejoj. En la rusa lernejo. El Nova Gvidado. Egale edukadi ambaŭ manojn. La sama kategorio apartenas la referencoj : Kongreso de la slava instruistaro en Prago la 9-14. de Aŭgusto 1908. Internacia oficejo por instruantoj de Espe-

ranto. La instruistoj « Amikaroj » en Francujo. La III-a internacia kongreso pri la instruado de desegnado. Rimedo por vekigi amon por la naturo kaj patrujo en niaj lernantoj. Praktika propono pri internacia kurso de lerneja manlaboro. Internacia krestomatia por la infanoj. Esperanto en la lernejo. La nordaj instruistkongresoj. Tria internacia kongreso por la familia edukado de la infano. Pri la komitatoj ekzamenantaj la literaturon por la junularo. Rekrutaj ekzamenoj en Svisujo. Internacia asocio por la racia edukado de la infano. Levilo de l'progreso.

Krome I.P.R. enhavis statistikan paĝon sur kiu ĝi publikigis statistikojn de la lernejoj en Eŭropo kaj kelkaj landoj. Ĝi preparis la pedagogian literaturon kaj pedagogiajn revuojn, publikigis longajn sciigojn el instruista kaj lerneja vivo. Regule ĝi raportadis pri vivo kaj laboro de la Internacia Asocio de Instruistoj. Ĝi zorgis ankaŭ pri la korespondado de la instruistoj kaj lernantoj. La kontakto kun ne esperantistaj pedagogiaj revuoj estis bona, multaj el ili skribis pri I.P.R.

Nia « telefono » estas originalaĵo de la redaktoro, per kiu li komunikas siajn novaĵojn, projektojn kaj ideojn al la legantoj kaj ili la siajn al li. Sajnas ke la interkorespondado estis tre vigla. Temas plejparte pri propagando. En la 2-a n-ro li bremsas la senpacieneculojn kaj atentigas ilin, ke la komenco devas esti singarda kaj modesta, en la unua jaro aperu nur kvar kalendaroj, dum la 2-a jaro ĝi aperos dumonate kaj nur en la 3-a au 4-a jaro ĉiumonate. Sed la 3-a n-ro aperis apenaŭ en Julio 1910. La redaktoro senkulpiĝas sin kaj plendas pri la kunlaborantoj : li ricevis multajn promesojn kaj malmultajn artikolojn. La « telefonado » li finas per : « La kvara kalendaro de I.P.R. eliros en Septembro aŭ plej malfrue en Oktobro kaj estos la lasta en la I. jarkolekto. La duan jaron ni komencos tuj poste kaj se niaj membroj plenumos la malgrandan peton, kiun oni povas legi en la 4-a kalendaro, la revuo aperados en la nova jaro pli ofte, t. e. dumonate kaj regule ». En la 4-a n-ro la « malgranda peto » ne aperis, kaj I.P.R. -malaperis.

Tio estas stranga. La redaktoro neniam menciis financajn malfacilaĵojn. I.A.I. havis 363 membrojn. Sajnas, ke ilia kotizaĵo (2,50 fr.) jare sufiĉis por kovri la elspezojn de la asocio kaj de la eldono de la revuo. Do, kio estis la kaŭzo de la ĉesigo ? La edzino de grave malsana Ĉejka, s-rino Dobroslava ČEJKOVA la 2 Apr. 1956. skribis al mi : « La kalumnioj kaj mensogoj prenis al mia edzo la tutan emon al plua laboro ». Aperis 114 paĝoj en formato 13 x 20,3. La tri unuaj n-roj havis kvarpaĝajn kovrilojn. Sur la 4-a n-ro staris Jaro I (1908-1910) kaj la enhavo de ĉiuj kvar n-roj. La revuon gvidis progresemaj principoj kaj ĝi staris sur la plej alta nivelo de tiama pedagogio.

Distra Pago

KONKURSO N° 1.

Jen la solvo :

Horizontale. — 1. Okulmezure ; 2. Mo-
no, Efik ; 3. Blu, Ko, Oft ; 4. RO, Fali, OO ;
5. Jeĵuno ; 6. Elekti ; 7. LO, Orea, IA ;
8. Epi, OF, ETS ; 9. Noto, Item ; 10. Apar-
tenaĵo.

Vertikale. — 1. Ombroplena ; 2. Kolo,
Oppop ; 3. Unu, JE, Ita ; 4. LO, Felo, Or ;
5. Kajero ; 6. Olukef ; 7. ZE, Inta, In ; 8.
Ufo, OI, ETA ; 9. Rifo, Iteĵ ; 10. Ektoplas-
mo.

Gajnintoj F-ino Amice, F-ino Arnould,
S-ro Bourry, Ges-roj Lanz, S-ro Le Coze,
S-ino Lemoine, F-ino Robin, F-ino Gu-
dula Thenee gajnis 2 poentojn. S-ro Gé-
nuit gajnis 1 poenton.

Ni gratulas ĉiujn.

KONKURSO N° 2

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2		■								■
3			■						■	
4				■			■			
5					■					
6						■				
7				■			■			
8		■						■		
9	■								■	
10										

Horizontale :

1. Kiu posedas mantelon.
2. Inverse : ne povanta okazi.

3. Fonetike : rondforma elstara parto
de iu organo ; inverse : duono da pi-
ramido ; participa finaĵo (r).

4. Batilo (r) ; inverse : pronomo ; in-
verse : enhavanta multajn vibrojn (r).

5. Planto (r) ; Bleki kiel tre ŝatata dom-
besto.

6. Longa vesto ; inverse : metalfade-
no (r).

7. Fonetike : algebra esprimo ; ŝati ;
inverse kaj fonetike : flugilhava infano.

8. 2 malsamaj vokaloj ; papago ; sufik-
so.

9. Sensprita.

10. Parto de militistaro.

Vertikale :

1. Fariĝi malsana pro malvarmo.

2. Amerika sovaĝa besto.

3. Inverse : sufikso ; Arbo el varmaj
landoj (r) ; fonetike : kanapo kun dikaj
kusenoj.

4. Inverse : granda (r) ; inverse : bo-
nega afero (r) ; komenco de atako.

5. Kies cerbo estas konfuzata de pasio
(r) ; inverse : ne plia ol.

6. Inverse : sukera substanco (r) ; ĝer-
minta sekigita greno (r).

7. Duono da granda glando ; fonetike :
frazo pruntita el iu aŭtoro kaj, metita
antaŭ libro por montri ĝian ĉefan ideon ;
participa finaĵo.

8. Membro de grupo (r) ; ceremonia
kapvesto (r) ; sufikso.

9. Anonci danĝeron.

10. Vortoj esprimantaj ŝuldan senton
pro ricevota servo.

Bonvolu sendi viajn solvojn ĝis la 25-a
de la venonta monato al S-ro Guillot,
Cours de la 4^e République, Gaillard (Hte-
Savoie).

INFORMOJ

ESPERANTO EN LA GAZETARO

« Skolske novine » en Zagreb (n-ro 27)
aperigis du artikolojn pri Esperanto.

La unua temas pri propono de Jugoslavija
Esperanto Federacio, ke Esperanto estu gra-
de enkondukata kiel nura deviga fremda
lingvo en la superaĵ klasoj de la okjaraj po-
polvernejoj.

En la dua prof. Antonia Albert raportas
pri la kunsido de la 1-a kaj 2-a sekcioj en
la 41-a U.K. en Kopenhago, pri la kunsido
de la Internacia Esperanto-Ligo de Instruis-
toj kaj pri la unua infankongreseto en la
Ludo-Cambro. La artikolo estas sufiĉe de-
tala.

Ĉu nur jugoslavoj aperigas ion en la pe-
dagogia gazetaro ?

Paska lernejo de la Societo de Britaj
Esperantistaj Instruistoj okazos tuj
post la Kongreso de la Brita Esperan-
to-Asocio, en la bela monteta regiono
de Mendips, Somerset, de mardo, 23-a
de Aprilo ĝis sabato, 27-a. La kosto
estas proksimume 4.500 fr. fr.

Oni ne povas garantii lokon post la
5-a de Januaro 1957. Informo have-
bla, kontraŭ r.k. de F-ino Olive Ro-
botham, 14, Wensley Road, Stockton-
on-Tees, Co. Durham.

Informoj el niaj Asocioj

Ni opiniis ke la aperigo de la jenaj informoj utilos al niaj legantoj.

I.L.E.I.

Funkciuloj por la periodo 1955-58 :

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, 70, Av. Victor-Ségoffin, *Toulouse*, Francio.

Sekretario, Kasisto, Gvidanto de Centra Oficejo : F-ino Violet C. NIXON, 183, Woodlands Park Road, Bournville, *Birmingham*, 30, Anglio.

Konsilantoj : S-roj HEITMÜLLER, SVANTESSON, TACCANI.

Membro-Asocioj :

Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio, Italio, Suomio, Svedio.

Aktivaj reprezentantoj en aliaj landoj :

Aŭstralio, Belgio, Danlando, Irlando, Izraelo, Japanio, Jugoslavio, Kanaria Insularo, Maroko, Norvegio, Portugalio, Urugvajo, Usono.

G.E.E. (800 anoj) (franca asocio)

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, Licea Lingvo-instruisto (adreso supre).

Generala Sekretario : S-ro F. THÉBAUD, C.C. Jeunes filles, *Caudry* (Nord).

Kasisto : S-ro E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, *Baugé* (M.-et-L.).

S.B.E.T. (192 anoj)

Prezidanto : S-ro Cyril LOVE, 11 Church Walk, Penn Fields Wolverhampton.

Sekretario-Kasisto : F-ino Violet C. NIXON (adreso supre).

LANDA SEKCIO HESSEN de « Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj » (42 anoj)

Sekciestro : Kurt SCHÖNRICH, Hallgarter Str. 10, *Wiesbaden*.

INSTRUISTA SEKCIO ĉe « Slovenia Esperanto-Ligo » (... anoj).

Prezidantino : Sonjo TAVČAR.

Sin turni al Sek. de S.L.E.L. : Marinko GIVOJE, Poŝtfako 275, *Ljubljana*.

E.U.G.I. (135 anoj) (germana asocio)

Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto : S-ro Heino HEITMÜLLER, (23) *Bremen* 8, Waller Heerstrasse 134.

INFORMOJN pri aliaj landaj edukistaj asocioj ni volonte publikigos.

ATENTU

Post Montevideo, ni devas repensi niajn metodojn. Nedubable ni devas penetri en ĉiujn kulturajn mediojn aŭ pere!


Unu el la rimedoj penetri en tiujn mediojn estas en viaj manoj, karaj legantoj, kaj plie vi mem rikoltos la frukton de via laboro : traduku el la esperantaj gazetoj ĉiujn artikolojn, kiujn vi opinias interesaj por iu gazeto nacilingva... ĝuste elektita.

Tiel vi konigos nian lingvon en larĝaj tavoloj kaj certe vi ricevos nur helpon de koncernaj redakcioj, ĉar vi servos ilin per interesaj artikoloj de alilandaj aŭtoroj.

*
**

Traduko kaj Publikigo, en la pedagogia gazetaro, de la artikoloj de I.P.R. estas permesata. Nepre estu indikataj : 1° la aŭtoro (se eble lia logloko) 2° la fonto (lasante la titolon en Esperanto kaj jene : « Internacia Pedagogia Revuo », jaro, numero, paĝoj).

Ni petas vin sendi 2 pruvekzemplerojn al la redakcio (ni transsendos unu al la aŭtoro).



La Esperantista Kulturdomo

Kastelo « GRÉSILLON »
BAUGÉ (M.-et-L.) Francio

Tél. 34

Akceptas dum la somero ĉiulandajn esperantistojn, kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn.

- Por trankvile ripozi en frateca atmosfero ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempoj ;

Venu al Esperantista Kulturdomo

Bela, komforta kastelo ; milda klimato ; agrabla regiono ; amikeca rondo ; jen ĉio-ĉi atendas vin en nia feri-restadejo.



Antaŭa enskribigo nepre necesa; frua peto por litrezervo konsilinda.

Informpeto sendota kun internacia respondkupono al :Esperantista Kulturdomo,
Kastelo « Grésillon », Baugé (M.-et-L.) Francio.